

KARAJ gepatroj kaj infanoj aliĝintaj al **IIK 2010!** (Internacia Infana-junula Kongreseto)

Bonvolu

++ konfirmi ricevon de tiu ĉi IIK-komuniko al bert.xxxxx@gmail.com

++ legi la tutan tekston detale kaj eble reagi,

++ printi ĉi tiun paĝon kun ĉiuj haveblaj informoj, gepatroj konservu dum UK.

ALVENO: Infanoj kun siaj valizoj kaj gepatroj alvenu sabaton, la 17-an de julio en UK-kongresejo kaj kolektiĝu ĝis la **17-a** horo en la salono "**Jáki**", kiu situas kontraŭ la libroserva salono "Privat", atingebla laŭ flanka koridoro post la ĝiĉetoj. Gepatroj povas tiam paroli kun la diversaj gvidantoj. Ĉiuj IIK-anoj kune forveturos ĉirkaŭ la **18-a** horo per buso al IIK-ejo en hotelo Acuario. Kaze de malfruo petu helpon ĉe ĝiĉetoj por ekz. mendi taksion

REVENO: Ĉiuj infanoj revenos al UK-ejo sabaton, la 24-an de julio ĝis **11h** per buso, eniros la salonon de Solena Fermo antaŭ ties fino, tie prezentos almenaŭ kanton. Post la kantado de La Espero kiel fino de Solena Fermo, gepatroj venu al mi por konfirmi antaŭ repreni siajn infanojn. Informu nun se vi bezonas pli frue forveturi.

ADRESO de IIK-ejo: Club Acuario (grupo Hoteles Cubanacán), Calle 248 y 5ta ave. Marina Hemingway, Playa, Habana, Cuba. Telefono +53-7-204.76.28 ĝis 76.33, fakso +53-7-204.43.79, reservas@hmar.mh.cyt.cu, sdircomercial@hmar.mh.cyt.cu

TRANSPORTO al IIK-ejo: Ne ekzistas publika transporto de UK-ejo (aŭ alia loko) ĝis IIK-ejo. Necesas peti taksion aŭ piediri **5 km**. En Acuario krom IIK-anoj loĝas kelkaj UK-anoj, tiuj disponas pri apartaj busoj al la UK-ejo kaj la urbocentro.

TELEFONA KONTAKTO: nepre nur se gravaĵo! Pro alta kosto, provu unue SMS-mesaĝeton:

+41-00 000 0000 s-ino Adélaïde Charrière, parolas Esperante, france, germane

+32-000-00.00.00 s-ro Matthias Humet, parolas Esperante, nederlande.

+52-1-0000000000 s-ino Concepción García Corona, parolas meksik-hispane

+52-1-0000000000 s-ino Llovana Martínez Mateos, parolas meksik-hispane

MERKREDA EKSURSO: La 21-an de julio, kiam UK tuttage ekskursas, IIK ekskursas probable al plaĝo kaj iu alia celo. Ĉiuj IIK-anoj jam plenigas la plej grandan disponeblan buson. Tial kaj pro organiza necerteco, IIK ĉi-jare ne ofertas al gepatroj partopreni tiun ekskurson. Se iuj gepatroj antaŭplanis partopreni, ili tion skribu tuj al mi.

INFANOJ NEPRE KUNPORTU TION:

+ individua pasporto por hotela registriĝi. Kubanoj bezonas nur identeckarton.

(Se infano registritas en gepatra pasporto, tiam la gepatro devas veni al la IIKejo)

+ turista karto (vizo por eksterlandanoj)

+ atestilo pri sanasekuro, kiun oni devas montri por eniri la landon (aŭ krompagi).

+ san- kaj vakcinad-kajeroj, san-asekura karto/formularo aŭ ties kopioj

+ UK-kongreskarto, por eniri UK-ejon kaj preni la kongresajn materialojn ĉe ĝiĉeto.

- medikamentoj kun uzinstrukcio, se necesas. Tiukaze informu min.

- kremo kontraŭ sunbruliĝo, ĉapo kaj okulvitroj kontraŭ forta sunlumo.

- sapo kaj dento-broso+pasto, ban-kostumo+tuko, eble bansandaloj por eniri akvon.

PETAS la meksikaj gvidantinoj al ĉiuj IIK-anoj kunporti (1) kompletan simplan **ĵurnalon** kaj (2) muzikon de sia **propra** lando, en la landa lingvo, laŭ landa ritmo, sur **KD** (lumdisko)

INFANOJ EBLE KUNPORTU TION:

- dorsosaketo por porti piknikon, ban-vest+tukon, akvobotelon dum ekskursoj.

- societaj tablo-ludoj, aliaj ludiloj, pilko, rakedo, volanludo ktp.

- ŝatata muziko sur KompaktDisko aŭ USB-memorilo (estos **diskoteko**)
- bloveblaj ludiloj kiuj flosas sur akvo en la hotela **naĝbaseno** (profunda 0,50-1,70m)
- muzikinstrumentoj, notoj kaj kanttekstoj (estos bona piano)
- kraĵonoj, papero, gluo restaj el lerneja jaro por desegni kaj skribi. Kaj tondilo
- notu la nomon sur ĉiuj vestoj se la infano emas forgesi vestaĵojn.
- fotilon (se elektronika fotilo, kunportu ĝian USB-kablon)

INFANOJ NE KUNPORTU TION:

- valoraj objektoj (perdo kaj ŝtelo ĉiam eblas, kvankam gvidantoj atentis)
- elektronikaj ludiloj (tiuj kreas ĵaluzon kaj malhelpas kunan aktivadon)

SANO:

- + Kaze de akcidento aŭ sanproblemo, ni konsultos kuraciston aŭ hospitalon, kiu decidos pri necesa traktado. Per transdono de viaj infanoj al IIK, implicite vi konsentas pri tiu maniero kaj vi engaĝiĝas repagi eventualajn kostojn. Ni provos antaŭe kontakti vin kaze de gravaĵo.
- + La infano kunportu san- kaj vakcin-kajeron aŭ ĝian kopion, utilan por kuracisto.
- + Ni iros bani kaj naĝi plurfoje. Tiam la infanoj restos sub kontrolo de plenkreskuloj kaj sav-naĝisto. Informu se via infano ne konas aŭ ne respektas la limojn de sia kapablo naĝi, plonĝi, subakviĝi. Informu se via infano ne rajtas bani aŭ naĝi.
- + Kontraŭ insektoj (dengo-kulo) oni portu leĝerajn vestaĵojn kiuj kovras la tutan korpon.
- + Kontraŭ intesta infekto (tifoido, salmonelo) gravas la man-higieno, aparte post fekado.

KIOM aliĝis ?

18 knabinoj de 7 ĝis 16 jaroj

17 knaboj de 3 ĝis 14 jaroj

11 plenkreskuloj de 23 ĝis 62 jaroj

9 loĝlandoj: Belgujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo/Katalunujo, Kameruno, Kubo, Meksiko, Nederlando, Svisujo

Viud fotetojn de ĉiuj: <http://bertosch.free.fr/iik2010/alighintoj.html>

Ĝis baldaŭ un UK kaj IIK !

Estime salutas Bert SCHUMANN, IIK-gvidanto kaj UEA-komisiito pri IIK.
urbo Cesson-Sévigné Francujo, la 1an de julio 2010

PS: Ekde la 9-a de julio mi ne plu estos hejme kaj tiam ne atingebla.

Mi alvenos en IIK-ejo jam vendredon, la 24-an de julio.